

5a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso

Verona, 23-28 aŭgusto 2002

Temo: Efektiva lingva egaleco, rajto de la Eŭropanoj

DUA BULTENO

ORGANIZA KOMITATO:
Verona Esperanto-Grupo
CP 1616, 37100 Verona, Italio

e-poŝto: esperantoverona@adriacom.it

Kun aŭspicioj de:
provinco de Verono
komunumo de Verono
universitato de Verono
turisma entrepreno de Verono,
itala nacia komisiono por Unesko

PROVIZORA PROGRAMO

✧ *Vendredo, la 23a de aŭgusto*
09.30 - 18.30 Kongresejo: Akceptado de kongresanoj
10.30-11.30 Gazetara konferenco
15.00 - 18.00 Kongresejo: Unua kunveno de la EEU-komitato (ne publika)
17.00 Inaŭguro de ekspozicioj
20.00 Kongresejo: Interkona vespero.

✧ *Sabato, la 24a de aŭgusto*
09.00 - 18.30 Kongresejo: Akceptado de kongresanoj
09.30-15.30 Kongresejo: Giĉeto por speciala porokaza filatela stampo
10.00-12.30 Granda Salono de Universitato de Verona
Solena kongresa malfermo: kunordiganto d-ro Umberto Broccatelli; parolos : prof-ro Elio Mosele, Rektoro de la Verona Universitato; d-ro Norbert Steimayr, reprezentanto de la "Itala Nacia Komisiono por Unesko"; d-ro Renato Corsetti, prezidanto de U.E.A.; s-ro Salvatore Argentino por la Organiza Komitato
Oficiala enkonduka prelego: prof. Humphrey Tonkin, iama Rektoro de la Universitato de Hartford, Usono.

14.30-19.00 Kongresejo: Naciaj kunvenoj: ITALA ESPERANTO-FEDERACIO, jara asembleo.
(Aliaj asocioj kiuj deziras kunveni anoncu sin, kun indiko pri la proksimuma nombro de partoprenontoj, por rezervi la ejon).

15.00-18.00 Vizito al la urbocentro
19.30- 21.00 Kongresa bankedo ĉe la Universitato
21.30 Dancvespero ĉe la Universitato

✧ *Dimanĉo, la 25a de aŭgusto*
08.30-09.30 Katolika Diservo ĉe la Preĝejo "San Paolo"
08.30-09.30 Kongresejo: giĉetoj malfermitaj
09.30-12.30 Kongresejo: prelegoj
09.30-10.25 Augusto Casquero de la Cruz: *Lingva situacio en Hispanio*
10.30-11.25 Claude Longue-Epée: *Lingva demokratio kontraŭ lingva diskriminado*
11.30-12.30 Umberto Broccatelli: *Perspektivoj de la lingva demando en Eŭropa Unio*
12.30-13.00 Muzika aperitivo

14.30-16.30 Dua kunveno de la EEU-komitato (ne publika)
 14.30-16.30 Kunveno de la Esperanto-Rondo de Alpadio
 16.45-18.45 Kongresejo: Kunveno pri **Euroscola**
 15.30-18.30 Vizito al la urbocentro
 21.00 *Ebleco spekti la operon "Nabucco" de G.Verdi en la Areno aŭ libera vespero*



Lundo, la 26 de aŭgusto: Tago pri Romeo kaj Juliet'

09.00-16.30 Kongresejo: giĉetoj malfermataj
 09.00-11.30 Kongresejo: prof.Humphrey Tonkin
 "Shakespeare, Italio, Internacia lingvo"
 11.45 Akcepto ĉe la urbodomo de la delegitaroj reprezentantaj la urbojn ĝemeliĝintajn kun Verono
 14.30-17.00 Kongresejo: Ĝenerala kunveno kaj konkluda publika raporto de la EEU-komitato al la kongresanoj.
 Debato. Aprobo de rezolucioj.
 18.00-19.30 Korto de la Malnova Merkato:
 "Romeo kaj Julieta" de W.Shakespeare, muzike, dance, parole kaj kavalire.
 21.15 Muzika koncerto



Mardo, la 27a de aŭgusto

09.00 - 11.00 Kongresejo: Ronda Tablo pri la kongresa temo
 Partoprenos: d-ro Ademaro degli Ademari-Provinca Skabeno pri Kulturo, d-rino Patrizia Martello, Urba Skabeno pri Eŭropaj Temoj, prof-ro Humphrey Tonkin, Claude Longue-Épée, Augusto Casquero de la Cruz, dr. Renato Corsetti.
 h.11.30-12.30 Fermo de la kongreso
 h.14.00 *Ekskurso per buso kaj ŝipo al Lago de "Garda"*



Merkredo, la 28a de aŭgusto
Tuttaga ekskurso al Venecio (trajne)

ALIĜILO

Familia nomo:
 Persona nomo:
 viro/virino (forstreku unu)
 Adreso: (nacilingve, latinlitere)
 Lando: (esperante)
 Tel.-n-ro (kun prefikso)
 Faks-n-ro
 e-poŝto:

Aliĝ-kotizoj en eŭroj

La kotizoj diferenciĝas laŭ du landgrupoj:
 A) Ĉiuj landoj escepte de tiuj sub B (kat. 1 ordinara kaj 2 reduktita).
 B) Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio, escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.; Afriko kaj Latina Ameriko (kat. 3 ord. kaj 4 reduktitaj).
 Junuloj (ĝis 30-jaraj), kunuloj de kongresanoj kaj handikapuloj pagas reduktitan kotizon. Por ĉiu aliĝperiodo sekvas la kotizoj laŭ kategorioj en la jena ordo:
 1 (Landoj A - Ordinara) / 2 (Landoj A - Reduktita) / 3 (Landoj B - Ordinara) / 4 (Landoj B - Reduktita)
 1 2 3 4
 ĝis 31 maj. 2002: 90 / 45 / 54 / 27 eŭroj
 poste 100 / 50 / 60 / 30 eŭroj
 (Infanoj ĝis 10-jaraj kaj akompanantoj de handikapuloj aliĝas senpage)

Mi pagis eŭrojn por aliĝo en kat. ...
 (ĉe kat. 2 kaj 4 indiku la motivon de la redukto: junulo - kunulo - handikapulo; forstreku la nevalidajn) al:
 a) organiza komitato per poŝta konto/ per ĉeko / kontante / per internacia poŝtmandato;
 b) al mia landa asocio (forstreku la nevalidajn)
 Dato Subskribo

INFORMOJ

PAGO DE ALIĜKOTIZO kaj ĉiuj pagoj al la organiza Komitato estu farataj je la nomo de la kasisto:

s-ro Sergio Antoniazzi, Via Brigata Casale 1, 37137 Verona, Italio, pere de:

- a) Poŝta konto n. 25673328,
- b) ĉeko en eŭroj,
- c) internacia poŝtmandato.

Bonvolu - al la sama adreso - sendi aliĝilon kun fotokopio de la pag-atesto.

Se estas problemoj pri transpago, bonvolu skribi por interkonsento.

Ĉe la fervoja stacidomo de "Verona Porta Nuova" funkcios la 23an de aŭgusto, de la 9a ĝis la 19a horo, akceptejo organizita de lokaj esperantistoj.

HOTEL-MENDO

Bonvolu atente tralegi la mendilon je p. 10..

KAMPADEJOJ

Bonvolu informiĝi pri eventualaj kostoj kaj rezervado de loko ĉe:

Campeggio Giulietta e Romeo

Strada Bresciana 54 - Ca' dell'Etreo -Verona: camping-verona@tin.it - tel. +39 0458510243

Campeggio Castel S.Pietro

Via Castel San Pietro 2, Verona

info@campingcastelsanpietro.com - tel/faks. +39 045592037

LOĜADO EN STUDENTA DOMO

Ĝi troviĝas je 15-minuta distanco de la kongresejo, sed eblas ankaŭ utiligi buson. En ĉambroj dulitaj, kun propraj servoj, sen matenmanĝo, por persono por nokto: 30 eŭroj. (Atentu: Enloĝigo ekde la 16 h. de la tago 23.8.02). Estas malmultaj lokoj, bonvolu **tuj mendi kaj pagi por la tuta restado al la kasisto de la organiza komitato.** (vidu mendilon je p. 10)

LOĜADO EN PORJUNULA KOLEGIO

Ĝi troviĝas je 20-minuta distanco de la kongresejo, sed eblas ankaŭ utiligi buson.

En ĉambroj dulitaj, sen matenmanĝo, komunaj servoj, por persono por nokto: 20 eŭroj.

Estas malmultaj lokoj, bonvolu **tuj** mendi kaj pagi por la tuta restado al IANTRA AGENTEJO (kiel por hoteloj, vidu mendilon je p. 11)

AMASLOĜEJO

Ĝi troviĝas je 20-minuta distanco de la kongresejo, sed eblas ankaŭ utiligi buson.

En ĉambroj plurlitaj, sen matenmanĝo, komunaj servoj, por persono por nokto: 11 eŭroj. **Atentu: oni devas kunporti dormosakon!!!!!!!**

Estas malmultaj lokoj, bonvolu TUI mendi kaj pagi por la tuta restado al IANTRA AGENTEJO (kiel por hoteloj - vidu mendilon je p. 11)

PRI LA KONGRESO

KONGRESEJO:

Universitato de Verono, via dell'Università 5.

En la placo ekster la fervoja stacidomo, troviĝas bus-haltejoj. Por atingi la kongresejon, vi povas trafi, ĉe la perono "A", busojn numeron 11, 12, 13, 51. Tie troviĝas ankaŭ biletvendejo kaj vi povos aĉeti:

- unuveturan bileton je la kosto de 0,93 eŭroj
- biletaron por dek veturoj, je la kosto de 8,70 eŭroj
- taga bileto valida ĝis noktomezo, je la kosto de 3,10 eŭroj.

La bileton vi devos ekvalidigi en la buso pere de la stamp-aparato.

De la stacidomo por atingi la kongresejon (Universitato de Verona, via dell'Università 5), vi bezonos 10-minutan busan veturadon; vi devos forlasi la buson ĉe la "Preĝejo de Sankta Paŭlo" (Chiesa di San Paolo) kaj pluriri 150 metrojn piede.

Ĉe la kongresejo, kongresanoj povos favorpreze tag- kaj vesper-manĝi ĉe la universitata manĝejo, kontraŭ pago de 7 eŭro por unu manĝo (unua plado, dua plado kun garnaĵo, pano, deserto, trinkaĵo).

Ĉe la kongresejo estas ebleco parki aŭtomobilojn.

SPECIALA POROKAZA FILATELA STAMPO

Sabato 24/8 ĉe la Kongresejo.

OFICIALA KONGRESA BANKEDO:

Ĝi okazos sabate (24/8) de h. 19.30 ĝis h. 21.00 ĉe la Universitata Restoracio.

Kosto: 34 eŭroj.

Mendu kaj pagu tuj al la Kasisto, kiel indikite en la mendilo.

Menuo: aperitivo, itala antaŭmanĝaĵo, rizoto kun cikorio, pastaĵo kun kremo kaj salmo, truta fileo kun migdaloj, viand-rostaĵo en salkrusto, laŭsezonaj garnaĵoj, frukta salato, ruĝa kaj blanka vinoj, mineralakvo, aliaj trinkaĵoj.

DANCVESPERO:

Ĝi okazos sabate (24/8), libera partopreno, ekde h. 21.30 ĉe la Universitata Restoracio.

OPERO EN ARENO DE VERONO:

Dimanĉo, 25.08.2002

"NABUCCO", de Giuseppe Verdi

Prezroj (laŭ la sidlokoj): eŭroj 154, 120, 100, 80, 21.50, 18

Se vi interesiĝas pri tio, bonvolu mendi kaj pagi al la Organiza Komitato kiel indikite en la mendilo. Pliajn informojn vi ricevas ĉe <http://www.arena.it>

TAGO DE ROMEO KAJ JULIET':

- prof-ro Humphrey Tonkin: "Shakespeare, Italio, Internacia lingvo"

- Korto de la Malnova Merkato: "Romeo kaj Juliet" de W. Shakespeare
Speciala prezentado kavalire, muzike, dance, parole (itale, ĉar ne eblas alimaniere, bonvolu pardoni)

EKSKURSO AL GARDA LAGO.

Kosto: 28 eŭroj

Mendu kaj pagu tuj al la Kasisto, kiel indikite en la mendilo.

h.14 - Forveturo de la kongresejo per aŭtobuso ĝis la lago, poste krosado per ŝipo. Ĉar la krosado estas iom longa (8 horojn), konsilindas aĉeti manĝaĵon ĉe la universitata manĝejo antaŭ ol forveturi; surŝipe funkcios trinkejo.

EKSKURSO AL VENECIO

Kosto: 33 eŭroj (trajno, ŝipo, tagmanĝo).

Mendu kaj pagu tuj al la Kasisto, kiel indikite en la mendilo.

Forveturo de la fervoja stacidomo: h. 7.40 akurate, sed oni devas esti ĉe la ĉefa enirejo je h. 7.25. En Venecio, kiam eblos, ni uzos la urbajn busojn do... ŝipon. La tagmanĝo ĉe memserva restoracio inkluzivos: lan pladon, 2an pladon kun garnaĵo, panon, fruktan salaton, akvon kaj vinon. La ekskurso daŭros pli-malpli 12 horojn, konsilindas aĉeti antaŭ ol forveturi ion por manĝi kaj trinki (en Venecio la prezroj estas iomete pli altaj). !!!!!!! Ĉar ambaŭ ekskursoj finiĝos iom malfrue vespere en Verona, bonvolu atente prikonsideri vian hotel-mendon.

POST DEK JAROJ EŬROPAJ ESPERANTISTOJ DENOVE KUNVENAS EN VERONO

En Eŭropa Unio teorie validas la principo ke ĉiuj ĝiaj oficialaj lingvoj estas samrajtaj, sed la praktiko instruas ke en multaj realaj situacioj la parolantoj de iuj lingvoj havas privilegian pozicion kompare kun la parolantoj de la ceteraj lingvoj. Ja, nekontestebla fakto ke estas tre malfacile kaj multekoste labori per multaj lingvoj. La uzado de komuna neŭtrala laborlingvo, kiu al neniu donu privilegion, povos alproksimigi la Eŭropanojn al situacio de efektiva lingva egalrajteco. Tio ĉi estas ĝuste la temo de la 5a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso okazanta en Verono de la 23a ĝis la 28a de aŭgusto 2002:

“Efektiva lingva egaleco: rajto de la Eŭropanoj”.

Partoprenos en tiu ĉi kongreso homoj el la diversaj regionoj de Eŭropa Unio, kaj ankaŭ el pluraj aliaj landoj.

LA EŬROPAJ ESPERANTO-KONGRESOJ

Jam en 1992, ĝuste 10 jarojn antaŭe, Verono gastigis Eŭropan Esperanto-Kongreson, kiu estis fakte kongreso de esperantistoj de la landoj apartenantaj al la Eŭropa Komunumaro.

Sekvis aliaj kongresoj, je du- aŭ tri-jaraj intervaloj, organizitaj sur la sama geografi-politika bazo; intertempe la Eŭropa Komunumaro fariĝis Eŭropa Unio; do tiaj kongresoj alprenis la pli ĝustan nomon “Eŭrop-Uniaj Esperanto-Kongresoj”. Post la unua en Verono (Italio) en 1992, la dua okazis en Parizo (Francio) en 1995, la tria en Stutgarto (Germanio) en 1997, la kvara en Ostendo (Belgio) en 2000 kaj nun la kvina revenos al Verono en la jaro 2002.

Tiuj kongresoj estas organizitaj de lokaj komitatoj sub la aŭspicioj de Eŭropa Esperanto-Unio, la kupola organizaĵo, kiu kunligas la landajn esperanto-asociojn de la landoj de Eŭropa Unio por komuna agado ĉe ties instancoj.

Okazos altnivelaj prelegoj kaj debatoj pri la kongresa temo, sed ne mankos ankaŭ alitemaj.

La Komitato de Eŭropa Esperanto-Unio laborkunvenos kelkfoje kaj landaj esperanto-asocioj povos havi siajn apartajn kunvenojn.

MENDILO por:

1. **STUDENTA DOMO**
2. **EKSKURSO AL GARDA-LAGO**
3. **EKSKURSO AL VENECIO**
4. **BANKEDO**
5. **NABUCCO**

REZERVADO pere de la ORGANIZA KOMITATO. Adresu pagojn al la kasisto,

s-ro Sergio Antoniazzi, Via Brigata Casale 1, 37137 - Verona, Italio
esperantoverona@adriacom.it

Fam. Nomo..... Pers. nomo

Kongresa numero:.....

Kompleta adreso:

e-poŝto

Studenta domo -

Mi mendas liton en dulita ĉambro kaj deziras loĝi kun

.....

kongresa numero

dato de alveno: 23.08.2002 ne antaŭ la 16a h. - dato de forveturo:

entutenoktoj

Prezo por unu nokto por unu lito, sen matenmanĝo: 30 eŭroj

Mi mendas

- | | | |
|---------|------------------------------------|-------------|
| 1. | noktoj en la studenta domo, entute | eŭroj |
| 2. | Bankedon | eŭroj 34 |
| 3. | Nabucco-n | eŭroj |
| 4. | Ekskurson al Garda-lago | eŭroj ...28 |
| 5. | Ekskurson al Venecio | eŭroj 33 |

Mi sendas pagon al:

s-ro Sergio Antoniazzi, Via Brigata Casale 1, 37137 Verona, Italio,
pere de:

a) poŝta konto n. 25673328, b) ĉeko en eŭroj, c) internacia poŝtmandato

**5a EŬROP-UNIA ESPERANTO-KONGRESO - VERONA 2002
MENDILO POR ĈAMBROJ EN HOTELO, PORJUNULA KOLEGIO,
AMASLOĜEJO**

Rezervado okazas per la Agentejo
IANTRA VIAGGI s.a.s. - Piazza Donatori di Sangue, 5 - 37124 Verona
Tel. +39 045 8303306; faks. +39 0458388581- e-poŝto: info@iantra.it

(Bonvolu skribi preslitere)

Familia nomo

Persona nomo

(viro /virino - forstreku unu)

Kongres-numero.....

Adreso (nacilingve; latinlitere):

.....

Lando (esperante).....

Tel.-n-ro kun prefikso faksilo.....

e-poŝta adreso:

HOTELOJ:

Mi mendas unulitan / dulitan ĉambron de kategorio

Nomo de eventuala ĉambrokunulo

Dato de alveno dato de forveturo..... sume
tranoktoj

Prezoj en eŭroj, por UNU tranokto kaj por UNU ĉambro, inkluzive de
matenmanĝo.

Kategorio Dulita ĉambro / Unulita ĉambro

3*** *superior* 110,00 100,00

3*** *standard* 105,00 85,00

2** 90,00 80,00

PORJUNULA KOLEGIO:

Mi mendas liton en dulita ĉambro, sen matinmanĝo, komunaj servoj.

Dato de alveno

dato de forveturo

sumetranoktoj

Mi deziras loĝi kun

Prezo por UNU tranokto kaj por UNU persono: eŭroj 20

Mi sendas:

- pagon de eŭroj 20 x nombro tranoktoj, entute

- kotizon por administraj kostoj: 16

Sume:

AMASLOĜEJO:

Mi mendas liton en plurlita ĉambro, sen matinmanĝo, komunaj servoj.

Mi kunportos dormosakon.

Dato de alveno

dato de forveturo

sume tranoktoj

Prezo por UNU tranokto kaj por UNU persono: eŭroj 11

Mi sendas:

- pagon de eŭroj 11 x nombro de tranoktoj, entute

- kotizon por administraj kostoj: 16

Sume:

Dato

Subskribo.....

La mendo devas alveni al la Organiza Sekretariejo ĉe la Agentejo *Iantra Viaggi s.a.s.* antaŭ la 16a de junio 2002. Oni akceptas mendojn nur post ricevo de la mendilo akompanata de la pago de la unua tranokto por la hoteloj kaj de la tuta sumo por la "Porjunula Kolegio" kaj por la "Amasloĝejo", plus kotizo de 16 eŭroj por administraj kostoj. Oni ne konsideros validaj mendojn sen pago kiel indikite.

PAG-EBLECO:

- per ĉeko je la nomo de **IANTRA Viaggi s.a.s. di Claudia Gozzi & Co.**



- per banka akredito (inkluzivanta la bankajn kostojn) je la nomo de *IANTRA VIAGGI s.a.s.*, ĉe *Banca Popolare di Verona, agenzia M, Via Mameli 54, Verona, Conto Corrente n 7909 codice ABI 05188/codice CAB 11715.*

ATENTU: NE eblas pagi per kreditkarto.

NULIGOJ DE MENDOJ

- Por nuligoj faritaj ĝis la 15-a de junio 2002 oni redonos je la fino de la kongreso nur la pagon por tranoktado.

- Por nuligoj faritaj post la 15-a de junio 2002 oni nenion redonos.



SITUO DE HOTELOJ UTILIGEBLAJ AŬTOBUS LINIOJ

Plano je paĝo 13

Tie estas montrata la centra parto de la urbo kaj la situo de la enurbaj hoteloj.

Jen estas la bus-linioj de la hoteloj al la Universitato.

Hotelo 1 - Linio 51 - de *Via del Minatore 5/a* ĝis *Via XX Settembre*, kaj inverse

Hotelo 2 - Linio 33 - de *Stradone Porta Palio* ĝis *Via Carducci* kaj inverse.

Hotelo 3 - Linio 12 - de *Via Tiberghien* ĝis *via XX Settembre* kaj inverse.

Plano je p. 14

Tie estas montrata la situo de la hoteloj en la urba periferio.

Por iri de la indikitaj hoteloj ĝis la Universitato, oni uzu blujajn APT-busojn - ĉi-sekve indikitajn - ĝis la Stacidomo kaj poste oranĝkoloran buson de la Stacidomo ĝis la Universitato.

Hotelo 7 - De *Negrar* ĝis *Verona Stazione* - 40 minutoj

Hotelo 5 - De *Parona* ĝis *Verona Stazione* - 30 minutoj

Hotelo 9 - De *San Bonifacio* ĝis *Verona Stazione* - 1 horo

Hotelo 6 - De *San Martino* ĝis *Verona Stazione* - 25 minutoj

Hotelo 8 - De *Castel d'Azzano* ĝis *Verona Stazione* - 20 minutoj

Por iri de la Stacidomo al la Universitato:

Linio 12 - De kajo ĉe *Stazione Verona* ĝis *Via XX Settembre*.

HIMNO al EŬROPO

Allegro maestoso

Kantu kune amikaro,
ni la ĝojon festas nur,
nek rivero nek montaro
plu landlimoj estas nun.

Ho Eŭropo, hejmo nia,
tro daŭradis la divid'.
Nun brilegu belo via,
ĉiu estas via id'.

Via flago kunfratigas
homojn post milita temp',
via leĝo nun kunigas
civitanojn en konsent'.

Sub la ŝildo de la juro
ni vivados en konkord'.
Tio estas nia ĵuro:
unu land' kaj unu sort'.

Tra l' Malnova Kontinento
nun laŭtigu nia kant',
flugu per facila vento
en la lingvo Esperant'!

Jen ekzemplo por la mondo:
jen direkto, jen la voj':
tuthomara granda rondo
en la paco, en la ĝoj'!

* * * * *

NI PROPONAS TIUN ĈI TEKSTON, LAŬ
LA MUZIKO DE LA 9A SIMFONIO DE
BEETHOVEN (*HIMNO AL LA ĜOJO*)
KIEL HIMNO DE LA UNUIGITA (AŬ
UNUIGENDA) EŬROPO.

*Esperantaj vortoj de Umberto
Broccatelli*